

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報



Jar-kajero 2017

Sibayama Zyun'iti 2017-12-09

La Jar-kajero de NeProfitocela Organizo Esperanto Jokohama (NEJ) en 2017

Mi skizu la eventojn en 2017. La specialaĵo ĉi-jara estas okazigo de la 104-a Japana Esperanto-Kongreso (=JEK) en nia urbo, kune kun Japana Esperanto-Instituto.

(Mallongigo por la kunvenejoj)

[KK]: nia Kutima Kunvenejo, nome Gubernia Kunven-Centro [Kanagawa Kenmin Sentaa] en Jokohamo.

[Lab]: la loko de la 104-a Japana Esperanto-Kongreso (=JEK), nome la Labor-Placo de Kanagawa [Kanagawa Roodoo Puraza]

*jan. 21 [KK] Hama-Ronda Vespero, kun prelego de s-ro Jamaŝita Toŝihiro el Kagoŝima, pri la traduko de Rakontaro de Genĝi, klasika japana romano, en Esperanton. Ĉeestis 14.

*jan. 29 [KK] La 3-a Jarkunveno de la rondo por buĝeto, planado, estraro ktp. Ĉeestis 17 personoj kaj estis 30 mandatoj.

*feb. 5 [ĉambro en la domo de JICA] Kadre de Jokohama Internacia Forumo, nia rondo havis 1-horan prelegon pri Esperanto, inkluzive de lernolibro-kolektado. 7 el ni kaj 19 civitanaj aŭskultantoj estis.

*feb. 18 [KK] Hama-Ronda Vespero: pri Koreio, lando de la 102-a UK prezentis s-ro Iwaya Mituru, kaj pri UK ĝenerale de aliaj membroj.

*mar. 4 [KK] 106-a Legokunsido pri "Hodler en Mostar" de Spomenka Ŝtimec. 5 partoprenis.

*mar. 11,12 [KK] Ekspozicio ĉe Foiro de civitanaj agadoj, de la grupoj, kiuj uzas KK kiel kunsidojn. Per komputila projekciado, s-ro Namba prelegis pri Miyazawa Kenzi, japana poeto-fabelisto kun simpatio al Esperanto.

*mar. 18 [KK] Hama-Ronda Vespero: Ni faris resumon pri la lernolibro-kolektado. S-ro Fuse pri la karakterizaj trajtoj de la lernolibroj kaj s-ino Doi pri la kolektado.

*apr. 15 [KK] Hama-Ronda Vespero omaĝe al la 100-jara mortodatoreveno de L.L. Zamenhof. Vizitis nin s-ino Maria Ĵurafska (laŭprononce) kaj s-ro Kujama Kouiĉi el Pola Instituto en Japanio. De nia rondo parolis Doi Hirokaz kaj Sibayama Zyun'iti. 19 partoprenintoj.

*maj. 13, 14 [Esperanto-Domo de Jacugatake] Kunvivado al la staĝejo de JEI, kun Hama-Ronda Vespero en la 13-a de majo post vespermanĝo komuna. Entute 11 partoprenintoj.

*jun. 3 [KK] 107-a Legokunsido pri "Serpentoj en putro" de Istvan Nemere. 6 partoprenis.

*junio --- Eldonis n-ran 500 de nia japanlingva organo "La Tamtamo", ekeldonita en 1967. Speciala n-ro kun gratuloj kaj rememorigaj artikoloj.

*junio --- Eldonis n-ran 327 de nia esperantolingva organo "Novaĵoj Tamtamas", kolore, speciale pri la projekto "Nia Unua Lernolibro de la lingvo".

*junio --- nia membro s-ino Itabaŝi Micuko eldonis tradukaĵon de japana infanliteratura

verko “La nanoj en domo kun granda zelkovo” de Inui Tomiko, el JEI.

*jun. 17 [KK] Hama-Ronda Vespero prepare al la 104a Japana Esperanto-Kongreso (JEK).

*jul. 15 [KK] Hama-Ronda Vespero prepare al JEK.

*jul. 22 [KK] Komuna lernado, i.a. per “skeĉo kun suflorado”, iniciatita de Aihara Misako. 3 Partoprenis.

*jul. 23 [Seulo en Koreio] Ĉe Movada Foiro en la 102-a UK, ni prezentis nin kaj la venontan Japanan Kongreson antaŭ la kongresanoj en la Movada Foiro.

*sept. 2 [KK] Prezento pri someraj spertoj. 8 personoj rakontis sian someran sperotn en Esperanto, el kiuj 6 pri Koreio aŭ UK en Koreio.

*sept. 9 [KK] 108-a Legokunsido pri “Surklifa” de Serĝo Elgo. 5 partoprenis.

*sept. 11-13 [KK] La 4-a Fotoekspozicio kaj la ekspozicio pri “Nia Unua Lernolibro”.



*sept. 16 [KK] Hama-Ronda Vespero prepare al JEK. Tiam ankaŭ prezentita estis komputila ludo “Kotonoha Amrilato” utiliganta Esperanton kiel lingvon de la rolantoj en la ludo.

*okt. 8,9 [Parko Grand Mall en Minato-Mirai] En la Internacia Festeno de Jokohamo, nia rondo havis ekspozician tendon.

*okt. 21 [KK] Hama-Ronda Vespero prepare al JEK.

*okt. 29 [Lab] Fina kunsido prepare al JEK.

*nov --- Eldonis originale esperantlingvan libron “Gvidlibro pri Jokohamo kun Eseoj Hamalogiaj, 2017”, redaktitan de Namba Fumiharu, verkitan de multaj el ni.

*nov --- Eldonis japanlingvan libron “Historio



de Esperanto-Movado en Kanagavo”, verkitan de Doi Ĉieko.

*nov. 2 [Lab] Preparado kaj muntado de ekspoziciaĵoj, prepare al JEK.

*nov. 3 [Lab] la 1-a tago de JEK. Inaŭguro, Arta Vespero.

*nov. 4 [Lab] la 2-a tago de JEK. diversaj fakkunsidoj, civitana kurso, bankedo en la ĉina kvartalo.

*nov. 5 [Lab] la 3-a tago de JEK. diversaj fakkunsidoj, Fermo, ekiro al oficiala postkongresa turismado (vespera bufedo sur krozŝipo)

*nov. 6 [en urbo Jokohamo kaj Kamakura] oficiala postkongresa turismado en la urbo, kaj ne-oficiala vizito al la tombo de Jui Ĉunoŝin.

*nov. 11 [KK] Postbabila kunsido post JEK. 18 partoprenis.

*dec. 2 [KK] 109-a Legokunsido pri “Simile al stelo en nokta ĉielo” de Akira Saŭa, trad. de Charles Rowe. 5 partoprenis.

*dec. 17 [en urbo Kawasaki] la 47-a Zamenhof-Festo de Kanagawa. (okazonta)

Niaj Planoj

<2018>

*jan. 13-mar. 31 [KK] Elementa kurso

*jan. 20 [KK] Hama-Ronda Vespero, kun prelego de Jamaŝita Toŝihiro pri la uzo de “smafo” (saĝtelefono).

*jan. 28 [KK] la 4-a Ĝenerala Kunsido de la NPO, kun resumo de la jaro 2017, plano pri la jaro 2018, kaj revizio de la statuto.

*feb. 4 [ĉambro en la domo de JICA] Kadre de Jokohama Internacia Forumo, nia rondo havos prelegon pri Esperanto.

Eseo

Eŭskaj infanlibretoj

Doi Hirokaz

En mia hejma eta biblioteko troviĝas parto de Esperanto. Libroj viciĝas laŭ alfabeto ordo de lingva nomo. En la unua parto estas libroj de la aĵna lingvo, sekvas la albana, la angla, la ĉeĥa, la ĉina kaj la lasta estas la vjetnama lingvo.

Inter ili ekzistas lingvoj, kiuj estas parolataj en malvastaj kaj limigitaj lokoj. Ekzemple ekzistas libretoj en la bretona lingvo, en la eŭska lingvo, en la lingvo de afrikaj triboj k.c. Multaj esperantistoj bone komprenas gravan rolon de la lingvoj en kultura vivo.

La bretona lingvo estas parolata en okcidenta Francio. Vi eble iam aŭdis pri la Edikto de Nanto. Nanto estas la nomo de la ĉefurbo de la regiono. La nombro de la parolantoj de la bretona estas 200 mil.

La eŭska lingvo estas lingvo parolata de eŭskoj en Eŭskio, regiono de nordorienta Hispanio kaj sudokcidenta Francio. Inter ambaŭ regionoj troviĝas la montaro Pireneoj. Vi scias nomon de la urbo Guernica. Pablo Picasso pentris fame konatan "Guernica". Ĝi famigis la urbon Guernica. Ĝi situas en hispana regiono de Eŭskio.



En la 26-a de aprilo 1937, germana aerarmeo bombardis la urbon Guernica, gubernio Bizkaia en Hispanio. Pri la afero priskribis ankaŭ svisa filozofo Johano-Jakobo RUSEO (Jean-Jacques ROUSSEAU).

Nombro de la parolantoj de la eŭska estas 660 mil. Ili parolas la eŭskan kun la hispana aŭ kun la franca.

Vi povas facile supozi, ke la bretona kaj la eŭska havas siajn historiojn de lingva diskriminacio. Tio estas batalo por sia vivrajto. Tio estas batalo de la vivo mem. Memkompreneble la bataloj estas por rezervi siajn kulturojn. Tio estas kultura batalo.

Eŭskio estas konata en Japanio sub la nomo de Basku, aŭ Vasku.

Hodiaŭ mi parolas pri libretoj por infanoj, kiujn oni tradukis el la eŭska en Esperanton.

Mi nun eniras en la ĉeftemon.


Sub la nomo de "Kolekto Lunlumo" eldoniĝis 7 libretoj ĝis nun. Mi aĉetis la unuajn tri libretojn en la libroservo de UK en Bonaero en 2014, kaj la lastajn tri mi trovis kaj aĉetis en ĉi-jara Seula UK. Bedaŭrinde ĉe mi mankas 1 libreto. Iliaj temoj diversas.



Hodiaŭ mi prezentos la unuan volumon el la Kolekto. Ĝi havas titolon "Knabo en Marso".

Ĝi estas la unua porinfana sciencfikcia rakonto en la eŭska lingvo, verkita en 1969, kiam la homoj atingis la lunon por la unua fojo.

Iun plaĉan tagon, aŭdiĝis speciala sono sur montopinto de marborda vilaĝo, kaj tie poste vidiĝis tre brila lumo. La marsanoj atingis



Eŭskion post vojaĝo en nifo tra la spaco. Ili volas kunporti eŭskan knabon al La Marso.

Saĝa kaj bonkora kaj kuraĝa knabo, nomita Unai invitite de marsanoj ekveturis al la Marso. Por vivteni li devis elekti profesion laŭ montrita listo. Li ekzamenis atente la nomojn, kaj la unua plej multe plaĉas al li. "Urbestro" estis skribita en la unua vico. Kaj li elektis Urbestron. Atentu la vorton, mi urĝe devas klarigi, unue de la urbestro, ĉar tie urbestro estis la plej malalt-ranga profesio.



Li devas purigi la stratojn, prizorgi la ĝardenojn, malsekigi la florojn per vino, por ke ili ne velku. La rangoj tie estas renversitaj.

Reveninte al la tero, al sia naskiĝloko, Unai fariĝis heroo, kaj fine oni elektis lin la urbestro. Vi povas supozi, kial li estas elektita.

Mi resumu ankaŭ sekvajn du libretojn, kiujn mi aĉetis en Bonaero.

La dua estas "Ĉapulo la fantomo". Ĝi temas pri la sorto de orfino kun bonkora kaj helpema fantomo. Ĝi estas mejlŝtona verko en la eŭska porinfana literaturo, verkita en 1982.



La 3-a nomiĝas "Klaŭda kaj la rivera sekreto". Ĝi estas ĉarma rakonto pri la knabino, kiu volas ludi futbalon. Sed en la epoko, tio estis malpermesata, nur ĉar ŝi estas knabino. Sed ŝi batalis kontraŭ malfacilaĵoj por montri al siaj amikoj kaj al iliaj gepatroj, ke ŝi plene rajtas futbali.

Ĝi ankaŭ klarigas originon de nuna futbala pilko.

La verkisto de tiu ĉi rakonto estas Aitor Arana.

En Eŭskio troviĝas Eŭska Esperanto-Asocio. En ĝi apartenas eŭskaj esperantistoj de ambaŭ flankoj de Pireneoj, francregiona kaj hispanregiona. Hispana Esperanto-Organizo oficiale ne agnoskas, kaj la organizo prenas Eŭskan Asocion sia filio.

En 2015 la asocio eldonis du gravajn publikaĵojn. La plej ampleksa vortaro Eŭska-Esperanta kaj Esperanta-Eŭska. Ĝi estas dudirekta vortaro kun po ĉ. 20 mil kapvortoj. Kaj la alia estas lernolibro de Esperanto por parolantoj en la eŭska. Oni eldonis la duan version en 2016. La aŭtoro de ambaŭ verkoj estas Aitor Arana.

Li naskiĝis en 1963. Li estas unu el plej fruktodonaj verkistoj en Eŭskio, kiu profesie verkas eŭske. Li tradukas eŭske, hispane, cigankaloe kaj Esperante. En nia lingvo li tradukis famajn librojn el la eŭska.

Li esperantigis tiun ĉi "Kolekto LUNLUMO".

Sekvantajn rakontetojn mi nur montras bildojn sen klarigo.

Eskerrik asko

Dankon!

(Prelego ĉe "Prezento pri someraj spertoj", septembro 2017)